CNT AIT FAI

INTERNACIA LABORIST-ASOCIO

# INFORMA BULTENO

NACIA KONFEDERACIO DE L'LABORO

IBERIA ANARKISTA FEDERACIO

REDAKCIA ADRESO: ESPERANTO-FAKO Av. DURRUTI 32-34
BARCELONO — HISPANIO

II-a jaro | 25 Septembro 1937 | Numero 6

# MURDISTOJ!



Ĉi bildo, kiun ni reproduktas, esprimas la plej grandan kruelecon de la aktuala milito. Senfortaj maljunulinoj, florantaj junulinoj k burĝonantaj infanoj, forlasintaj karan fajrejon k forkurantaj pro la bombardantaj ilin teŭtonaj k italaj aeroplanoj, krias korŝire: Murdistoj! Murdistoj!

Proletinoj el ĉiuj landoj, ĉesigu la ekstremadon de viaj hispanaj fratinoj! Deklarau ĝeneralan strikon en ĉiuj landoj! Malfunkciigu la fabrikejojn, en kiuj produktiĝas militmat rialojn sendotajn al perfida Franko! Publike linĉu la ulojn, kiuj kontribuas per kio ajn al Franko! Vi italaj k germanaj proletinoj, leviĝu amase, multope, milionope sur la stratoj de Romo k Berlino, proteste demonstraciu, barikadigu, okazigu revolucion, akuzu, linĉu la generalojn k la militistojn, por ke ili ne plu sendadu perforte viajn edzojn, fratojn, filojn al la hispania teritorio por defendi la interesojn de la internacia faŝismo murdante viajn fratojn k fratinojn. Likvidu unufoje por ĉiam la tiranojn, la civilizitajn barbarojn! Hitler k Musolini, kiuj sangigas la mondon per nova inrenacia milito. Proletinoj el ĉiuj landoj, viaj hispanaj fratinoj de vi atendas multegon! Savu ilin el la ungegoj de la morto!

# LA KLASDEVO DE MONDPROLETARO

La 19an de Julio 1936 finiĝis periodo, kiu estas plej angora k fiaskoplena el la historio de la tutmonda proletaro. Escepte la triumfon de la rusa revolucio, ĉiuj intencoj al laborista emancipiĝo, kiuj registriĝis postmilite, estis sange sufokataj. La alrevolucia pelado de l'germania popolo, la bavara komuno, la hungara komuno falis.

En Italio, post la movado de la uzinokupado, oni starigis la faŝismon, k ekde tiam ŝajnis, ke la kapitalista reakcio estus nehaltigebla torento, ŝajnis, ke la laboristaj amasoj estus kondamnitaj ĉiuloke perei k metiĝi sub terura reĝimo.

La hispana proletaro metis finon de ĉi returna periodo, disiĝa k fiaskoplena por la internacia proletaro. Unuafoje la faŝismo renkontis sur la Iberia teritorio bastionon k vidis forvaporiĝanta sian nevenkeblan legendon, pruviĝinte kiel la laboristaj amasoj povas kontraŭstari la armitan reakcion de l'eksplutantoj per solida k batalema forto.

Jen tial nin firmigas dum la lukto, kiun la laboristoj el Hispanio entreprenas ekde pli ol unu jaro, la konvinko, ke ni ne nur batalas por ni mem, sed ankaŭ por la laboristoj el la tutmondo. Ni rezistadas teruran militon; ni faras revolucion, kies rezultoj estos poste utilaj al la afero pri la socia justo, ne nur dezirante nin liberigi el la jugo, kiun la ribelinta militistaro el Hispanio songis altrudi al ni, sed por vidigi horizontojn al liberiĝo de la proletaro el Italio, Aŭstrio, Germanio k el ĉiuj landoj premataj de diktaturo, por malebligi, ke la aliaj popoloj, kiuj ankoraŭ vivas relative libere, pereu siavice sub la faŝista kalkanumo.

Jen la profunda senco, la granda historia projekcio de la Ibera Revolucio. Komprenu la mondproletaro, ke ĝia celo estas la nia, ĝi ne devas ŝpari klopodojn por sukcesigi nian triumfon, kiu tiom dependas de ĝia kooperemo, ĉar refalus sur ĝin la sekvoj de nia fiasko. Parafraze ni povas afirmi, ke la revolucio samkiel la reakcio estas nedivideblaj. Ĉi veron ne neglektis la mondkapitalismo. Ekde la komenco ĝi sin konsideras rekte tuŝata k minacata de la rezistado, kiun la Iberia popolo faris k faras al la faŝista atako. La partioj, la klasoj, la plutokrataj grupoj, interesiĝintaj savi la socipolitikan sistemon, kiu garantias ties privilegiojn, ĉirkaŭprenis la aferon de Franko k dediĉis ĉiujn siajn energiojn k siajn ebleecojn al la de ili nomata "ruĝa Hispanio" "sanigan kurtenon" por evitigi, ke la alloga ekzemplo de la Iberia proletaro, translokiĝinte al la aliaj popoloj, sennaskigu en la mondo la revolucian flamon.

Estas tute superflue atesti, ke la liverata helpo de la plutokratio k la reakcio internaciaj ne limiĝis al platonaj komentoj. Mono, armiloj, homoj, ĉiuj manovroj de la politiko, ĉiuj kaŝitaj ebleecoj de l'demokratio estis mobilizataj pri tiu ĉi afero: nin dispremi. Ili estas mobilizataj ĝis tia grado, ke nune malamiko tiom timinda por la hispana popolo, kiel tiu, kiu buĉas niajn fratojn k fordetruas niajn regionojn, estas tiu, kiu silente manipuladas en la Eŭropaj ĉefurboj, en la registaroj k en la kancelarioj.

Antaŭ tiu ĉi realaĵo, tiom perceptebla, la laborista solidaro al la proletaj amasoj el Hispanio decide por definitiva kolodo akordiĝu al la cirkonstancoj. La proletaro el la diversaj landoj ne povas jam limigi sin montri al ni sian interfratiĝon, helpante nin per emociaj k kortuŝaj "tagordoj", aŭ sendante al ni nutraĵon aŭ monon. Ĝi devas konsideri la hispanian problemon kiel propra, kiu estas replantata en la tuta Eŭropo k ĉie en la mondo. Ĉiu avangarda partio, ĉiu proletorganizo el ĉiu lando devas doni defendon al la hispana proletaro en ĝia programo pri la urĝa lukto k afero, ĝi devas koincidi pri la agitaddevizo en sia propra lando kontraŭ ĝia gvidanta klaso k ĝia registaro.

La internacia burĝa politiko tiel nomata "neinterveno", kies fatalaj konsekvencoj por la antifaŝista Hispanio estas antaŭ ĉies okuloj, devas renkonti responde proletan politikon de decida "interveno". Nur trovinte la opozicion de la organizitaj laboristaj fortoj, starantaj batalpretaj por rompi iliajn krimecajn dezirojn, la registaroj, kiuj ĝis nun sekvas la planojn de Franko, diktataj de Romo k Berlino, ŝanĝos sian kondutlinion.

Ni turnas nin al la sindikataj organizoj, al la politikaj partioj —senescepte— kies dediĉo al la afero de la libero k de la homa progreso elmontriĝis super taktikaj k ideologiaj diferencoj, kiuj karakterizas la sociajn k la politikajn skolojn. Ni turnas nin aparte al la antifaŝistaj k laboristaj organizoj el Anglio k el aliaj landoj, kies regantoj turniĝas al la influhava brita diplomatio.

Konforme al la kondutnormoj de ĉiu organizo ebliĝu lukto konkreta, viva, vigla: Ĉio kio signifas materialan helpon kontraŭ la faŝismon! Por savi la Hispanian popolon, por savi sin mem, konsiderante la ĝeneralan faŝistan atakon, sekve de eventuala venko de Franko, Hitler k Mussolini, ĉiuj popolaj fortoj devas senhezite plenumi tiun devon.

La liberaj homoj el la mondo ne plu devas lasi sola la Hispanian popolon kontraŭ la faŝista internacio. Tio estus pli ol eraro, pli ol krimo —memmortigo. La laborista klaso, kiu devas plenumi historian mision ne povas elekti la memmortigon.

(El "Solidaridad Obrera".)
Trad. OSBANTO



La loko, kie pereis 19 an de Julio 1936 k-do Francisco Ascaso. La fotografaĵo estas farita le lia parenco. La inicialoj C. N. T. estas skribitaj per la sango, eliĝinta el la pereinta Ascaso.

## SENHONTA ĴURNALISTO

La reakcia franca ĵurnalo "L'Ouest-Eclaire" publikigis en Aŭgusto serion da artikoloj sub titolo "Katalunio sub teroro". En tiuj artikoloj la konata faŝisto Saint Michel elverŝas sian k tiun de sia klaso malamon kontraŭ Katalunia labora popolanaro k ĝiaj organizoj C. N. T. k F. A. I. Liaj "honestaj" deklaroj pri la defendo de la historia vero neniel malhelpas al li mensogi k mistifiki laŭ plej malnobla maniero pri la hispaniaj okazantaĵoj.

Post kiam li raportas laŭ tre kurioza maniero pri la pluraj sociaj klasoj k organizoj en Katalunio, li deklaras senhonte, ke la ribelo en 19 de Julio ne estis organizita de la hispanaj generaloj, pastraĉoj k kapitalistoj, helpataj de la germana k itala faŝismo, sed de la... anarkistoj. Poste li aplombe asertas, ke la ribelo de la militistoj en Barcelono k Madrido ne estis disbatita de la anarkistoj, sed de la registaraj fortoj.

Por estigi indignon kontraŭ la revolucia popolanaro li raportas pri amasaj forraboj, kruelaĵoj, murdoj k. s. Samaplombe li disvastigas la erarigon pri inerto de la anarkistaj milicanaroj ĉe la Aragona fronto. K al ĉiuj estas konate, ke la anarkistaj milicanaroj ĉe la Aragona fronto ne povis entrepreni ofensivon konsiderindan, tial ke la centra registaro ne donis la necesajn municiojn, sen kiuj ne eblas kia ajn ofensivo. K male la konkero de la fortikigita k strategia pozicio Belĉite fare de Divizio 25, konsistigita precipe el anarkistoj, elokvente pruvas la batalemon de niaj milicanoj, se ili havas la necesajn militmuniciojn.

Kvankam ke li loĝis en Katalunio antaŭe k post la juliaj okazintaĵoj k konas la senhoman ekspluatadon k la sklavecon, al kiuj estis metita la laboristaro, kvankam ke konas la sangan premadon, kiun suferis ĝi, kiam provis akiri pli homan ekziston, Saint Michel, kiel ĉiu bona katoliko, ne diras eĉ vorton pri la klopodoj de la hispana proletaro al pli justa k libera vivo, sed lamentas pri la sorto de tiuj, kiuj ne plu povas rabi, murdi k ekspluatadi la proletaron.

Ankoraŭ pli evidenta iĝas lia malamo kontraŭ la laboristaro k aparte kontraŭ ĝiaj organizoj C. N. T. k F. A. I. raportante pri la antagonismo inter la pluraj antifaŝistaj sektoroj k parte pri la Majaj okazintaĵoj. Kiel estis atendeble, li aprobas la kontraŭrevolucian k kontraŭlaboristan agadon de la politikaj partioj, kiuj tiaokaze, kiel same ĉe multaj aliaj, ricevis la subtenon de la franca k angla demokratio.

Pri la reorganizado de la transporto, produktado k ĝenerale de la ekonomia vivo flanke de la laboristaj organizoj en esceptaj malfacilaj cirkonstancoj, kiujn la milito estigas, li mencias neniel. Li ignoras ĉiujn sociajn, ekonomiajn k kulturajn akiraĵojn de la laboristaro. Li maskas la punindan intervenon de la internacia faŝismo k kapitalismo en Hispanio.

Sed ĉiĉio nin ne surprizas. Li, kiel multaj aliaj, estas pagita por disvastigadi kalumniojn k mensogojn pri revolucia Hispanio k narkotadi la konsciencon de la diverslandaj laboristoj.

La laboristaro devas stampi per malhonoro k linĉo tiajn, sin forvendintajn al la kapitalismo senhontajn ĵurnalistojn!

P.

Imprenta Cultural - Salmeron, 241 - Telf. 81076 - Barcelona

## LA BARCELONA EKSPOZICIO

La esp. ekspozicioj per si mem estas taŭga k efika propagandilo. Tamen la grado de ĉi taŭgeco k efikeco troviĝas en organika dependo de la bona organizado. Multaj ekspozicioj fiaskas ĝuste pro sia malbona organiziteco. Pro la sama kaŭzo fiaskis ankaŭ la Barcelona.

Ni anoncis en unu n-ro de "Informa Bulteno", ke la Barcelona esperantistaro aranĝas grandiozan antifaŝisman ekspozicion. Tamen oni donis al ĝi iom tro oficialan karakteron. K kiel rezulto aperis la unuflankeca organizado de la ekspozicio. La lasta perdis sian popularan, por ne diri antifaŝisman nuancon.

La konferencoj, kiuj okazis en la periodo, dum kiu daŭris la ekspozicio, ne substrekis ĝian antifaŝisman celon. Iu novebakita gazetisto, kiun komence oni prezentis kiel ukrajnano, poste kiel nederlandano k finfine kiel norvego, paroladis je la temo "Kion volas Esperanto". Li mem tamen ne sciis kion volis diri. Li pritraktis la problemon tre diletante por ne diri tre profane k per tono neserioza, eĉ ŝoka. Graŭ Casas, temigante pri la disvastigo de Esperanto, babiladis pri ĉiuspecaj religiaj movadoj k sektoj. Aliu paroladis pri Oomoto-movado. K en la lasta konferenco horo kantis la katalunan nacian himnon k la Internacion. Tiele la kataluna nacia himno k la Internacio boamikiĝis...

Certe oni elcerbumis, ke la antifaŝismo esceptas ajnan naciismon, k ke, plie, la naciismo k la religio prezentas la kanvason de la faŝismo.

La ekspoziciataj libroj ne estis en granda kvanto. Poste ne ĉiuj tendencoj de la esperantismo estis akcentitaj. Abundis literaturaĵoj de la neutrala movado, dum tiuj de la laborista estis tute neglektitaj. Estis videblaj pluraj libroj kun religieca enhavo, pluraj ekzempleroj, eĉ jarkolektoj de diversaj organoj de la neutrala movado, dum eĉ unu ekzemplero de la gazetoj k revuoj, esprimantoj de la laborista esperantismo. Eĉ unu libro eldonita de S. A. T. ne estis ekspoziciata. Eĉ unu ekzemplero de "Sennaciulo" aŭ "Sennacieca Revuo" ne estis ekvideblaj.

Mi vizitis la ekspozicion 8 fojojn, esperante malkovri inter la libraro almenaŭ unu libreton eldonitan de S. A. T. Sed-vane.

Mi turnis min al Montserrat, unu el la organizantoj de la ekspozicio k kiu estas ne nur S. A. T.-ano, sed, plie peranto de S. A. T., tamen kiu portadas la insignon de U. E. A.:

Kam... samideano, vi ne ekspozicias librojn eldonitajn de S. A. T.

—Ne.

—Pro kio?

—La libroj estas tie en la skatoloj.

—Kial do estas en la skatoloj?

—?!

La unuaj 4 n-roj de "Informa Bulteno" komence estis ekspoziciataj, sed poste mistere formalaperis senpostsigne. Eble al la nevideblaj anĝeloj, kiuj protektadis la ekspoziciatajn bibliaĵojn, ne plaĉis tiun insultaĵon k formalaperigis ĝin.

La ekspozicio ne povis plenumi sian antifaŝisman taskon. Ĝi ne estis amase vizitata. La publiko estis treege limigita. La unuflenkeca organiziteco, kiu tuŝis ĝian antifaŝisman trajton, malsukcesigis ĝin.

Tio servu por instruo al la organizontoj de ekspozicioj.

PARIO.

# INTER LA KAMPARANOJ DE ARAGONO

## En Aragono naskiĝas nova vivsistemo

La tre konata inter la internacia laboristaro socialisto k aktiva membro de C. N. T. k-do A. Souchy verkis libron pri la nova vivo de la Aragonaj kamparanoj, post ties kolektivigo. La libro prezentas plejan intereson. En kelkajn sinsekvajn n-rojn de "I. B." ni presigos iujn el ĝiaj ĉapitroj.

Tuj post 19 de Julio 1936 estiĝis kolizioj en pluraj vilaĝoj de Aragono inter la kamparanoj k la faŝistoj. El multaj vilaĝoj foriris amase la kamparanoj, forirante pro la persekuto organizita de la faŝistoj Kiam pli poste alvenis en Aragono la antifaŝistaj kolonoj de Katalunio k Levante (Valencio) la vilaĝoj estis liberigitaj el la gvardioj k la faŝistoj. Tiam revenis la kamparanoj. Komenciĝis procezo de socia transformiĝo, kiu ne havas similaĵon en Hispanio rilate al komplekso k profundeco.

En Aragono la disparcelado de la tero estis malsama ol tiu en Katalunio. Ekzistis grandaj terposedintoj, sed ili estis malplimulto. La plimulton formis la etposedintoj, la farmposedintoj k la mezklasanoj. La mezklasanoj laboradis en la bienoj de la grandaj terposedintoj, k devis akiri parton el la rikolto. La nombro de la taglaboristoj sen propra tero estis malgranda. Sed tiel ili, kiel la mezklasanoj devis serĉi antaŭe dum multaj monatoj laboron en la urbo, ĉar la loka tero ne povis vivteni ilin. La grandaj terposedintoj forkuris al la faŝistoj pro la antaŭenmarŝado de la popolmilicioj de Katalunio.

La kamparanoj decidis en ĝeneralaj kunvenoj, okazintaj sur la placoj, la eksproprigon de la tero de la faŝistaj posedintoj. Ankaŭ la cetera tero estis kolektivigita k municipigita. Preskaŭ en ĉiuj komunumoj oni decidis laboradi kolektive. 510 vilaĝoj k urboj kun proksimume 500000 entuta loĝantaro, starigis la kolektivismon, ekonomian formon k socian sistemon, nekonatan ĝis nun en moderna Eŭropo. La transformiĝo de la sistemo pri la privata propreco en sistemon pri kolektiva propreco realiĝis dum tempo relative mallonga k en surpriziga profundeco.

La kolektivigado en Aragono markas finalan punkton de la kampara reformo, kiu estis urĝa ekde 1931. La agrara reformo de la Respubliko ne estis solvo por la kamparana proletaro. Oni ja eksproprigis, sub la signo de la reformo, malmultajn el la grandaj terposedintoj, nur la tero aparteninta al la eklezio k al la religiaj kongregacioj estis eksproprigita. Ĝi estis reparceligita inter la kamparanaj familioj, sed la mizero inter la kamparanaj amasoj daŭre ekzistis. Kiam la povo de la reakcio estis forigita 19an de Julio 1936, la kamparanoj realigis sian idealon—la kolektivigon.

En ĉiuj vilaĝoj en Hispanio la komunumoj okupis sin pri la tero. Sed nenie en Hispanio iris tiel antaŭen la procezo pri la kolektivigado kiel en Aragono. La kolektivigo ne estis ordonita de la ŝtato, nek farita perforte kiel en Rusio. La plejparto el la kamparanoj sentis la idealojn de la socia revolucio. Produktadi kolektive, distribuadi la produktaĵojn justece inter ĉiuj, tio estis la celo. Ne ekzistis difinita plano pri la kolektivigado. Ne ekzistis dekretoj, neniu registara komisiono intervenis, neniu oficiala orientigo, laŭ kiu povus esti regataj la kamparanoj, estis donita. Ili agadis laŭ sia mema intuicio. Iniciativojn donadis pli aktivaj kamparanoj. Inter la kamparanoj vivadis la idealo pri la libera komunismo. Estis admirinde vidi, kiel la sana k homa racio de la kamparanoj, sen multaj konoj teoriaj, sen profunda sperto, ĉiam aranĝadis la aferojn. Kun tiu intuicio, kiun havas la homoj en tempo vere revolucia, la kampara loĝantaro puŝis sin al laboro por konstrui novan vivon.

La novaĵo pri la kolektivigado k pri la libero komunismo en Aragono ekkuris tra tuta Hispanio. Sed nek en Hispanio, nek en la eksterlando oni konas la veran enhavon de la kolektiva vivo en Aragono. Priskribo kiel vivadas la kamparanoj, kiel ili organiziĝis, kiel interkompreniĝadas, ankoraŭ ne ekzistas. Oni ankoraŭ ne skribis la historion de la socia revolucio, kiu realiĝis en Aragono ekde 19 de Julio 1936.

K tamen tio kio okazas en tiu regiono estas de maksimuma graveco por la socialista movado tutmonda. Pli ol duonmiliono da kamparanoj, puŝataj de la bezonoj, de la mizero k de siaj idealoj, prenis en siajn manojn la kondukilojn de sia vivdestino. Egaleco, Libero, Frateco, la grandecaj sopiroj de la franca revolucio, restis nerealigitaj en la mondo. En Aragono ili regas en la praktika vivado. La kamparano estis liberigita el la politika premado k el la ekspluatado de la grandaj terposedintoj. Oni atingis la liberon, batalante. Oni organizis la egalecon, k la frateco vivadas en la koro de la popolanaro, radiumante la tutmondon.

A. SOUCHY



Cu vi konas ci idioton kun kapo simila al poto? Li aspektas kiel prioro, sed estas la portugala diktatoro Oliveira Salazar.

## BATALKANTO

*Laŭ la konata melodio de Hans Eisler.*

Rajt', rajt', por la rajt'
batalu nun, laboristar',
Rajt', rajt', por la rajt',
ni falos sur malamikar'.
Ne plu estras nin la kapital',
sed ni kantadas pri klasbatal'
per flama melodi'.
Ni luktu por hejmoj k vi,
nur la socialismon volas ni,
formortas jam la filistrar'.

rekantaĵo

Kamaradoj, suferegoj
nun estas sufiĉaj jam,
tenu fermitaj la vicojn ruĝajn,
estas nun tempo ja.
La faŝismon ni venku,
ariĝu, kamaradar'.

Kamarado, kunbatalu, estu solidar'.
Rajt', rajt', por la rajt',
senmaskiĝu la fiular'.
Rajt', rajt', por la rajt',
Disiĝu la gren' de l'ŝelar'.
La kapitalismo, potenca iam,
en la ŝimarĉon ekdronos tiam
pro stulta profitem'.
Dum nia venk' ekkonstruos ni,
k stariĝos socialisma soci'
libera k sen mizer'.

*Esperantigis: B. C. Rasenberg - Becora*

## INTERNACIA ANTIFAŜISTA SOLIDARO (S. I. A.)

La lukto, kiun aktuale subtenas la hispania popolanaro, plivastiĝas ĉiutage k alprenas internacian karakterizon. Dum la unuaj monatoj la popolanaro devis kontraŭbatali nur la hispanajn faŝistojn, sed hodiaŭ sur la hispania teritorio oni kontraŭbatalas la faŝistojn italajn, germanajn, portugalajn k a.

La kampo de tiu batalo ne limiĝas sur la tuta Mediteraneo, Portugalio, Sudfrancio k aliaj landoj.

Dum 14 monatoj ni estas batalantaj k ankoraŭ ne vidiĝas la finalo de tiu batalo. Ĉiutage komplikiĝas la situacio k anstataŭ antaŭvidi la baldaŭan finalon, oni ekvidas klare, ke ĉiutage ĝi plivastiĝas k alprenas karakterizon de internacia milito.

Tiel fortaj estas la legiloj, kiuj unuigas la internaciajn faŝistojn k kapitalistojn, k ilia helpo eĉ sen pakto estas tiel efika, ke oni simple miriĝas. Kvankam ke ili estas entuziasmegaj naciistoj, ili unuiĝas en internacia sklado. Kvankam ke ili apartenas al malsamaj religioj, ili kunvivas k kune kontraŭbatalas la hispanian popolanaron.

La hispanaj kamaradoj, vide de la militplirastiĝo, decidis organizi la internacian antifaŝistan solidaron. Ĉiuj laboristoj, ĉiuj liberprofesianoj devas organizi la internacian antifaŝistan solidaron, ĉar en mala okazo ni estas pereintaj.

Ni ne povas kontentiĝi nur per la solidaro en Hispanio. En iuj landoj iuj kamaradoj jam faris paŝon por krei la organizon pri Internacia Antifaŝista Solidaro. Ankaŭ en aliaj landoj kamaradoj estas pretaj krei ĝin. Konvenus, se en ĉiuj landoj, en kiuj troviĝas kamaradoj, pretaj helpi al la antifaŝisma Hispanio, organiziĝus en grupon k interrilatiĝus sin kun la centra oficejo de la organizo.

Tie, kie ekzistas grupo da simpatiantoj, al la antifaŝisma Hispanio, tie kie ekzistaj legantoj de nia bulteno, okazigu kunvenon k decidiĝu organizi sekcion pri la Internacia Antifaŝista Solidaro. K ili turnu sin por konsiloj al la jena adreso: Internacia Antifaŝista Solidaro (S. I. A.).

Paz, 29, 2. Valencio. Hispanio.

## PROMENEJO

Ni bedaŭras, ke ni devas ankoraŭfoje malfermi ĉi rubrikon. K tiom pli ni bedaŭras, ke materialon por ĝi havebligas "Popola Fronto". Sed en tio konsistas nia tasko— ne nur donadi al la tutmonda laborista esperantistaro informaĵojn, aŭtentajn, nefalsitajn informaĵojn pri la hispana afero—milito k revolucio—sed pli senmaskigadi tiujn, kiuj malhoneste misinformadas ĝin.

Jen antaŭ ni staras la lasta n-ro (20 k 21) de "Popola Fronto". En la rubriko "Notoj pri la interna politiko" ni legas: "La Konsilantaro de Aragon, institucio, kiu kaŭzis, kaŭzas k kaŭzos ankoraŭ longtempe grandan diskutadon inter ĝiaj kreantoj k ĝiaj atakantoj, ĵus estis forigata de la registaro, ne perforte, ĉar ĝi mem akceptis sian likvidon, laŭ la sukcesanta plano de la registaro. Ni ne volas ĉi tie hodiaŭ fari kritikon pri ĝia tuta bazo k funkciado, ni nur mencias, ke tiu speco de regiona provizora registaro tre doktrineco laŭ inspiro de tendenco, agadis k ne sciis ligi al sia politiko la aragonan kamparanaron, ĝis tia ekstremo, ke multaj vilaĝanoj pro la perfortigaj procedoj de la regantoj, forkuris al la faŝista teritorio. La nova metodo estas bona garantio!"

Unue—rilate al la forigo de la Konsilantaro de Aragon. La vero, la pura vero estas, ke la registaro, celante efektivigi la "revolucion", forigis per speciala dekreto de 11 de Aŭgusto la Konsilantaron de Aragon, malorganizis multajn kolektivigitajn mastrumejojn, kiuj estis al la kamparanaro grava akiraĵo de la revolucio de 19 de Julio 1936, k la konsilantoj estis arestitaj. Joaquin Ascaso, la prezidanto de la Konsilantaro, ankaŭ estis arestita k pri lia sorto nun oni scias nenion.

La informaĵo de "P. Fr.", ke la "Konsilantaro de Aragon... ĵus estis forigata de la registaro, *ne perforte, ĉar ĝi mem akceptis sian likvidon, laŭ la sukcesanta plano de la registaro*", estas centprocenta elpensaĵo. Certe ja, laŭ "P. Fr.", Joaquin Ascaso, la granda liberecana funkciulo, ne estis "perforte" arestita, ĉar li mem akceptis sian enkarcerigon", laŭ la sukcesanta plano de la registaro". Ĉu ne popolfrontanoj?

Due. La Konsilantaro de Aragon ne estas "speco de regiona provizora registaro". Ĝi estas reprezentantaro el la kamparanaro laŭ la sistemo de la federalismo sur la bazo de la libera komunismo.

Trie. La Konsilantaro de Aragon neniel "tre doktrinece, laŭ sia inspiro de tendenco, agadis" k neniel "nesciis ligi al sia poliko la aragonan kamparanaron". La Aragona kamparanaro estis liginta sin al la Konsilantaro ĝis tia grado, ke kiam la registaro dekretis la malorganizadon de la kolektivigitaj mastrumejoj, ĝi energie esprimis sian proteston per amasaj kunvenoj k mitingoj. Samokaze ankaŭ la Kataluna Regiona Federacio de la Kataluna Kamparanoj organizis en Barcelono en la salono de Gran Price grandan

mitingon. Multaj kamparanoj el Aragono pro esprimita protesto estis arestitaj k enkarcerigitaj, aliaj persekutataj.

Kiom koncernas al la aserto, ke "multaj vilaĝanoj pro la perfortigaj procedoj de la regantoj, forkuris al la faŝista teritorio", ni devas konfesi, ke vere estis forkuroj al la faŝista teritorio, tamen ne de vilaĝanoj, sed de faŝistoj. Ni petas la redaktantoj de "P. Fr." argumenti per konkretaj faktoj sian aserton, t. e., ke "multaj vilaĝanoj, pro la perfortigaj procedoj de la regantoj, forkuris al la faŝista teritorio". En mala okazo ili mem stampus sin kiel demagogojn, malverdirantojn k mistifikantojn.

En la artikolo "Nia Pozicio" post plendo, ke "kelkaj—tre malmultaj legantoj—de "P. Fr." subite dubetas pri nia celo k rolo", proklamas: "Popola Fronto estas kunligo—ne kunfandiĝo—de laboristaj k proletaj partioj k politikaj sektoroj de liberalaj etburĝoj".

Pli ĝuste Popola Fronto estas kunligo nur de politikaj sektoroj de etburĝoj, ĉar C. N. T. k U. G. T., laboristaj organizoj, kiuj ampleksas la plejmulton el la hispanaj laboristoj k proletoj, ne partoprenas ĝin, la ceteraj laboristaj k proletaj partioj prezentas nekonsiderindan malplimulton.

Poste ni legas: "Tute senbaza estas la kalumnio pri persekutado pro pensoj k ideoj. La popola justeco punas k enkarcerigas nur malamikojn, kiuj ofte kaŝas sian fuŝan varon per tre respektindaj nomoj".

Ĉu Kamilo Berneri k Andres Nin, kiuj estis inkvizitorece murditaj, "ofte kaŝis sian fuŝan varon per tre respektindaj nomoj"? Ĉu Joaquin Ascaso, heroldo pri libero k justeco, "ofte kaŝis sian varon per tre respektindaj nomoj"? Ĉu la multaj, la centoj da sinceraj antifaŝistoj, la plejmulto el kiuj batalis ĉe la fronto k kiuj nun estas enkarcerigataj, "ofte kaŝis sian fuŝan varon per tre respektindaj nomoj"? Rezultas, ke la "popola justeco punas k enkarcerigas nur malamikojn", kiuj batis la faŝismon.

Iom pli sube en la pritraktata artikolo: "Respondecaj organizoj proletaj ne subtenas senkontrolajn agojn de egoistaj izoluloj aŭ de aŭtonomiaj grupoj, kiuj ne meditas la sekvojn de sia agado. Tiel neniu serioza laborista organizo suferas persekuton aŭ ĝenon de la registaro, sed ili ĝuas normalan vivon k ekzistorajton".

C. N. T. k F .A. I., du grandaj laboristaj organizoj, kies organizitaj laboristoj k proletoj disbatis en Katalunio la faŝismon k cementis la ŝeangulan ŝtonon de nova socia k ekonomia ordo, ne "guas normalan vivon", ĉar multaj el iliaj aktivaj elementoj estas enkarcerigitaj, aliaj persekutataj, Kunvenoj, mitingoj, organizataj de ili estas ofte malpermesataj, iliaj gazetoj ofte konfiskataj k malaperigataj portempe. Sed ŝajnas, ke ĉi ĉio, laŭ la redaktantoj de "P. Fr.", ne estas por antaŭ la eksterlanda publiko.

Fine la redaktantoj desegnas la fizionimion de "P. Fr." jene. "Popola Fronto ne estas komunista, sed ankaŭ, ho komprenehle! antikomunista, nek anarkista, nek antianarkista. Nia klasbatalo estas sufiĉe milda por akcepti plaĉe k danke la favoron de multaj liberalaj neŭtraluloj".

Jes, jes, ni konsentas, ke "Popola Fronto ne estas komunista; nek anarkista" k ke ĝia "klasbatalo estas sufiĉe milda por akcepti plaĉe k danke la favoron de multaj liberalaj neŭtraluloj". Sed pri tio, ke ĝi ne estas antianarkista—ni dubas, k krome la redaktoroj mem de "P. Fr." apenaŭ povus maldubigi nin.

En la raporto pri la Roterdama kongreso ni legas: "Kamarado Hernandez atentigis la gekongresanojn pri la konkreta k nediskutebla fakto, ke en Hispanio neniu honesta laboristo, neniu proleta organizo, neniu vera revoluciulo estas persekutataj aŭ ĝenataj pro siaj specifaj opinioj, La anarkistoj, kiel ĉiuj aliaj, estas plenrajtaj, ili kunvenas, eldonas sian multenombran gazetaron, libere kritikas, propagandas en mitingoj ktp. agadas influe en la sindikatoj de C. N. T. Ili okupas gravajn postenojn k oficojn, ili estas urbestroj, kiel tiu de Valencio mem, komandas batalionojn k havas ĉiajn ŝancojn".

Ni jam vidis, ke ne "neniu honesta laboristo", ne "neniu proleta organizo", k ne "neniu vera revoluciulo estas persekutata aŭ ĝenata pro siaj specifaj opinioj", preterlasante komprenehle la marksistan organizon P. O. U. M., kiu estis malorganizita komplete, multaj el ĝiaj membroj enkarcerigitaj, aliaj persekutataj.

La atentigo sekvas: "Pri la krima ribelo de Majo, ni ne forgesu, ke ĝi ne estis subtenata de C. N. T., kies instancoj kondamnis ĝin. Tiu monstra ribelo estis sufokita de Registaro sub la prezido de Largo Caballero, kun kvar ministroj anarkistaj, elstaraj gvidantoj de la hispana anarkismo".

Eŭrika! Finfine "P. Fr." malkovris, ke "la ribelo de Majo ne estis subtenata de C. N. T., kies instancoj kondamnis ĝin". K de kiu estis subtenata? Kio murdis Kamilo Berneri, la 12 liberecanaj junuloj, kiuj estis ponarditaj loŭdire en la soldatejo Karlo Marks? Pro kio, senpere de la Maja okazaĵo, la komunista gazetaro tratrumpetis tra la tutmondo, ke la ribelo de la hispanaj anarkistoj estas sufokita?

Ni bedaŭras, ripete, ke ni devis ankoraŭfoje malfermi, ĉi rubrikon. Tiom pli ni bedaŭras, ke materialon por ĝi havebligas "P. Fr.". Sed en tio konsistas nia tasko—ne nur donadi al la tutmonda laborista esperantistaro informaĵojn, aŭtentajn, nefalsitajn informaĵojn pri la hispana afero—milito k revolucio, sed plie senmaskigadi tiujn, kiuj malhoneste misinformadas ĝin.

# KION SIGNIFAS TIO?!

En la ĵurnalo "Diario Vasco" (de 3. 9. 37), aperanta en San Sebastian, ni trovas la jenon: "Alvenis al naciista Hispanio letero datumita en Valencio 21-25an de Majo adresita de Prieto al Fernando de los Rios, kiu (letero) netrafis la adresiton. Jen el ĝi kelkaj paragrafoj absolute aŭtentikaj: "Fernando de los Rios, socialista embasadoro... Fine jam solviĝis en tre grava parto la forpurigo de nia ariergardo. Kiel en Barcelono tiel en ĝia provinco estas elartikigitaj la risortoj de F. A. I. k C. N. T., mortigitaj aŭ enkarcerigitaj iliaj pli danĝeraj elementoj.

La forpurigo ne estas ankoraŭ kompleta, sed jam estas rompita la brava rezistaro k al ni estos facila nova arestado laŭsajne malforta sed efika, k post iom ĝi estos kompleta. Ni timis, ke la brigadoj de tiuj elementoj, kiuj troviĝas ĉe la fronto forlasos nin alkuri al helpo de sia organizo, sed ili ne kuraĝis k estas malfacile organiziĝi. Krome ni decidis serion da ofensivoj en la pluraj frontoj; en kiuj estos uzataj C. N. T. k F. A. I. kiel atakantojn k ni decidis ankaŭ translokigi ilin al la sektoroj, kie estas pli da batalo; tiele la faŝistoj helpos al ni por kompletigi la tutecan forpurigon k ni devas danki al la tri ŝtatoj, kiuj helpis al ni k kiuj lastatempe postulis de ni tian konduton"...

Ni nur citas. La k-doj faru la konkludon.

# KRONIKO

La troviĝanta en Hispanio rusa gazetisto Kolcov publikigis en "Pravda" tre fantazian rakonton pri la formalapero de Nin. La profesia gazetisto pretendas persvadi la legantaron, ke Nin estis forprenita el la karcero de faŝistoj k poste murdita. Kiel pruvon Kolcov mencias pri trovo de leteroj. "Frente Libertario", tre grava liberecana ĵurnalo, aperigante tre detalan biografion pri Nin, kvalifikas la "dokumentojn" de Kolcov kiel liaj memaj elplumigitaĵoj k atentigas, ke se efektive estus ekzistintaj tiaj leteroj, ili estus konataj al la hispanaj ĵurnalistoj, k ne estus necese, ke li venu el Rusio por malkovri ilin.

* * *

Laŭ oficiala statistiko sekve de la faŝistaj atakoj super Madrido en la daŭro de 12 monatoj, t. e. de 6 de Aŭgusto 1936 ĝis 6 Aŭgusto 1937, registriĝis 768 mortintoj k 3567 vunditoj. La statistiko estas nur pri la partoprenintaj en la bataloj.

* * *

La prezidanto de la Socialista Internacio Luis de Brouckere deklaris antaŭ ĵurnalistoj: "La vera unueciĝo de la politikaj partioj kiel plej konvena por la hispana popolo, estas la klopodo alproksimigi ĉiujn proletajn elementojn enlandajn k plie ĉiujn proletajn movadojn eksterlandajn. Mi havas egan simpation al la anarkosindikista movado ĝenerale k aparte al la hispana, kvankam ĝia vidpunkto ne koincidas kun la mia. Ĝi ludis tre gravan historian rolon en Hispanio. La unueciĝo de la proletaro estus malebla, se oni ne komprenus la anarkistojn".

* * *

La gazeto "C.N.T.", organo de la Madrida Federacio de la Laboro, estis malpermesata portempe de la polico. La motivo estis la publikigo de gravaj dokumentoj, inter kiuj letero de la komunista militisto Lister, adresita al Madridaj sampartianoj.

* * *

Ekde iu tempo la Komisarejo pri Propagando de la Generalitato aperigadas informbultenon katolikan k la Barcelonaj radiostacioj dissendadas periode diskursojn, per kiuj oni defendas arde la religiecan obskurantismon k. kontraŭbatalas la antireligiajn konceptojn. Ni havis paciencon aŭskulti unu el tiuj ridindaj diskursoj, kiu estigis al ni eksterordinaran surprizon k senliman indignon. Ŝajnas kvazaŭ mensogo, kiam de tiaj oficejoj, dum estas malpermesate utiligi la radiojn por revoluciaj organizoj, oni povas aŭskulti kiel ekz. la sekvantajn stultaĵojn: "Mi komprenas la grandan doloron de la katolikoj nepovante aŭdi liturgion". "La ateismo estas teoria k praktika absurdaĵo". "Ĝis 15 tagoj, se Dio volas". K multaj aliaj stultaĵoj samstilaj. La kontraŭreligia propagando de Generalitato evidente kreskadas kresĉende. Ja dio estas kun ni! K poste—la kataluna P. S. U. C. havas en siaj manoj la propagandon. Tio estas alia bona garantio...

* * *

Armeokomandinto, rifuĝinto el Santander, raportis, ke sur la plaĝo de la sama urbo estis mitralile mortigitaj 250 milicanoj. La krimo estis farita de la maŭroj, la "naciista armeanaro" de Franko.

En la Barcelonaj karceroj troviĝas kelkaj centoj de antifaŝistoj, al kiuj oni atribuas ĉiujspecajn akuzojn. Multaj el la enkarcerigitoj pro la malbona k malhigiena reĝimo suferas malsaniĝon. En la ceteraj urboj de la Respubliko ankaŭ estas enkarcerigitaj centoj da antifaŝistoj.

* * *

La 11an de Septembro Generalitato aranĝis en Barcelono feston okaze la datrevenon de la Liberigo de Katalunio. Okazis manifstacio. Ĉiuj organizoj devis manifestacii antaŭ la starigitan estradon por esti salutitaj de la oficialuloj. Pro la tre nacieca nuanco de la festo, ne ĉiuj liberecanaj organizoj partoprenis ĝin. Partoprenis parto el C. N. T. k F. A. I. La manifestacio de C. N. T. k F. A. I. komenciĝis je la II k duona k daŭris ĝis la dua posttagmeze. Flirtiĝadis dekoj da ruĝnigraj flagoj k dekoj da plakardoj kun devizoj. Jen kelkaj el ili: "Ni volas la liberigon de ĉiuj antifaŝistaj enkarcerigitoj"! "La revolucio estas garantio por la militgajno!!" La milito k la revolucio estas nedivideblaj!" La portintoj de la plakardoj haltadis antaŭ la estradon por ke ili estu legataj antaŭ la mikrofono. Aparte impone estis la granda kolora portreto de Durruti. La manifestaciantoj ekvolis, ke la orkestro ludu la anarkistan himnon "Filoj de l' Popolo". La oficialuloj rifuzis. La manifestaciantoj insistadis, ekprotestis: "Vivu la tribanoj!", "For Komorera!" La vortoj estis direktitaj al la komunista ministro Komorera, kiu ĉeestis sur la estrado inter la aliaj ministroj, kiu antaŭ nelonge nomis per tia epiteto la anarkistajn milicanojn, kiuj kiuj batis en Barcelono la faŝismon k atingis al la ĉirkaŭaĵoj de Zaragozo. La manifestaciantoj kun la portreto de Durruti ne foriĝis ĝis kiam oni ne ludis la himnon. La ceteraj organizoj malfruiĝis pri la manifestacio tial ke, pro manko de homoj, devis atendi antaŭ siaj lokaloj, ke ariĝu amikoj. P. S. U. C. estis reprezentita pli per flagoj k plakardoj ol per anoj, ĉar iuj el la manifestaciantoj portis po 2-3 flagojn. La manifestaciado de ĉiuj ceteraj organizoj, inkluzive P. S. U. C. daŭris 45 minutojn.

* * *

La 12an de Septembro devis okazi kunveno de la Barcelonaj fervojistoj. Ĉe la komenco de la kunveno tamen sin prezentis pluraj policanoj, venigitaj de la policestro. La fervojistoj konsideris la ĉeston de la polico kiel provokon k forlasis la kunvenejon proteste.

Aliaj kunvenoj k mitingoj, kiuj devis okazi en la komenco de Septembro estis malpermesitaj de la polico. Hm! K la redaktantoj de "Popola Fronto" provadas persvadi la publikon, ke en Hispanio la anarkistoj "ne suferas persekuton k ĝuas normalan vivon"!!

* * *

En la komenco de Septembro la polico traserĉis en Barcelono la loĝejon de laborista esperantisto. Inter la aĵoj ĝi trovis la lastan n-ron de "Sennacieca Revuo" k forŝiris la paĝon sur kiu komenciĝas la artikolo "Barcelono plej supera espero de l' Revolucio". Iuj Barcelonaj S. A. T.—anoj esprimas dubon, ke ne estas esceptite sekvi malpermeso pri la eldonaĵoj de S. A. T.

---

K-do M. Duplan dez. kores. kun esperantistoj el la fronto. Adreso: M. Duplan, Sana (H-te, Savoie) S-t Jean D'Aulli, Francio.

# LETERUJO

A. Absina.—Aviño. La mono ricevita. Dankon!

M. Leereveld. — Amsterdamo. Ĝuste en kiu n-ro de "I. B." vi legis pri la menciata Kantona Gazeto? Ni ne estas anoncintaj pri ĝi. La adreso de "Proleta Voĉo": Seccion de Esperanto de A. E. T., str. Kropotkin, 30, Barcelono.

Knud O. Pedersen.—Jylland. Ni sendos la sendeblan. La abonpago ne estas fiksita. Laŭvole kotizu al nia peranto. Antifaŝistan saluton!

G. Kordenoovdt.—Den Haag. La monon alsendu al nia Amsterdama peranto k-do T. C. KLIJN, Dapperstr 123-huis, Amsterdamo.

Johann Christannentl.—Albacete. Pri via korespondinto ni nenion scias.

Guerniol G.—Sa Houssaye. Dankon pro la res. kup!

Hubert Belltrojv.—Liége. Dankon pro la res. kup! N-ro la sendota.

Clety Auguste.—Dunquerque. Dankon pri la res. kup. "I. B." sendota regule.

T. Rol Bankersen.—Krommenie. K-do Emmerig recevados ĝin. Dankon pri la res. kup!

A. Smit.—Amsterdamo. La monon al nia peranto en Amsterdamo! La kotizo estas libervola. Antaŭen, frateto!

I. B. Rasenberg.—Roterdamo. Dankon pri la esperantaĵoj! Laŭbezone ni sendos ilin al la fronto.

Greta Ericsson.—Sundsvall. Sendu la koncernajn gazetojn kun artikoj tradukitaj de vi k la alia k-do el "I. B.". Li recevados regule la bultenon. Ni sendadas senpage la bultenon al ĉiu senmona, senlabora k legema k-do. Ni antifaŝiste gratulas vin k vian k-don pro la energian k aktivan tradukadan agadon. Sendube per tio vi kontribuadas al la revolucio k al la antifaŝisma batalado. Letero baldaŭ sekvos.

A. Bengtsson.—Hasestad. Ĉiuj senlaboraj k-doj povas ricevadi "I. B". sufiĉas, se ili anoncos al ni sian adreson. Sanon!

A. Duval.—Salteville. Regule ni sendadis la bultenon. Sed pro kio vi ne ricevadis ĝin—nu ni mem ne konas la kialon.

Elis Dahlgren.—Vikmanshyttan. Dankon pro la rs. kup. Sendota.

Rondelet Fernand.—Huy. Materialon por la atanĝota ekspozicio sendita al via adreso. Ni sendados al via adreso hispanlingvajn gazetaĵojn por la rifuĝintoj, kiuj loĝas en forlasita kastelo ne tre malproksime de via domo. Salutu ilin en nia nomo!

Folke Rosen.—Stokholmo.—Pro via energia k senlaca agado, elmontrita dum la S. A. T.-kongreso, ni esprimas sinceran k fratecan dankon. Kiel rezulto el via propagando nin trafis leteroj, petantaj la bultenon. Via ekzemplo estas imitinda k imitenda de la k-doj.

Chang Hsia.—Malayan. K-do, monon alsendu al niaj perantoj, kies adresoj estas troveblaj en la bulteno. Se tio ne eblas, alsendu usonan monbileton al unu el niaj internaciaj adresoj.

J. Bout.—Roterdamo. Vi konsideras la tuŝitan de vi temon tre grava. Nu bone—verku artikolon. Ni volonte presigos ĝin.

Wilhem Heller.—Leimeritz. Ni plu sendados. Ankaŭ al la profesoro Hekl. Sanon!

Otto Bakke.—Oslo. Dankon pri la res. kup!

F. Vilar.—Barcelono. Ne taŭgas. Venu al la redakcio.

E. Westebroek.—Krim per la lek. Materialon por la ekspozicio ni sendis.

Nore Jonsson.—Orebro. Dankon pri la alsenditaj esperantaĵoj! Sendotaj al la fronto al k-doj.

## Deponejo "INFORMA BULTENO"

| | | |
|---|---|---|
| RESTUTUTO ALBERC | COSENTAINA | 4 p-toj |
| J. ĜIOL, | BARCELONO | 3 p-toj |
| G. MARTINEZ, | BARCELONO | 6 p-toj |
| E. CAPDEVILA, | AZUARA | 6 p-toj |
| ULBON, | ALICANTE | 10 p-toj |
| ARTEMIO ESPAÑOL, | ALCOVER | 10 p-toj |
| T. JAMACA, | TOKIO | 1 jeno |
| E. VIVANCOS, | BARCELONO | 6 p-toj |
| F. VILAR, | BARCELONO | 6 p-toj |
| NILS LATH, | FABARA | 10 p-toj |
| J. WELSER, | MARLAIX | 50 fr.fr. |
| CRESENCIA GIL, | FRONTANO | 10 p-toj |
| J. B. RASENBERG, | ROTERDAMO | 1 fr. |
| B. C. RASENBERG, | ROTERDAMO | 1 fr. |
| L. ROZEBLOOM, | ANGLIO | 2 fr. |
| CH. v. PRAAG, | ROTERDAMO | 0'20 fr. |
| G. v. PRAAG, | ROTERDAMO | 0'25 fr. |
| G. VEREZEN, | ROTERDAMO | 0'35 fr. |
| KLAS KARLSSON, | RYD | 3 sv.kr. |
| FRANK JONSSON, | ANEBY | 5 sv.kr. |
| RUNE FREDERIN, | KOPPARBERG | 3 sv.kr. |
| JOHANO CASTÉT, | LE PERREUX | 50 fr.fr. |

Al ĉiu ni esprimas sinceran antifaŝistecan dankon!

La adresoj de "Informa Bulteno" por mono:

K-dino A. BOIS
a' MECE' par VITRE'
(ILLE-et-VILAINE)
Francio

K-do Adr. Persson
Stadshagen 13 A
Stokholmo
Svedio

K-do T. C. KLIJN
Dapperstr. 123-huis
Amsterdamo
Nederlando

K-do, ne elcerbumu la adreson, al kiu vi devas alsendi monon.

K-do J. Lezan el Pouy (Francio) tradukis el "I. B." la jenajn artikolojn: "Pri la falo de Bilbaŭ", "La farso de Eden" k "Ĉiulandaj laboristoj, helpu tuj!". La unua artikolo estis presita en la ĵurnalo "L'emancipation (Toulouse) k la ceteraj en "L'etendard" (Toulouse).

La redakcio esprimas al li egan dankon pro lia intensa tradukado k disvolvata propagando favore al la afero de proleta Hispanio.

* * *

La ĵurnalo "Tierra y Libertad", presorgano de F. A. I., estas malpermesita de la polico de Negrin.

* * *

Kiam la bulteno jam estis kompostita, ni eksciis pri la liberigo de k-do Joquin Ascaso.